Antaŭen, al la batalo kaj venko!

Manifesto de la IV-a
IPF-Kongreso

El germ. lingvo
trad. N. Incertov



EKRELO LEIPZIG 1931

MANIFESTO

al la proletariaj liberpensuloj de la tuta mondo

(Unuanime akceptita de IV kongreso de Internacio proletliberpensula en Teĉen-Bodenbaĥ la 15/16-an de novembro 1930 j.)

Laboristoj, laboristinoj kaj laborista gejunularo!

La IV tutmonda kongreso de Internacio proletliberpensula (IRF) alportis al la social-demokrataj disrompantoj kaj perfiduloj neniigantan malvenkon.

Fierante kaj ĝojegante ĉiuj klaskonsciaj liberpensuloj povas saluti la fakton, ke oni sukcesis starigi Internacion de proletliberpensuloj al la fronto de la klasbatalo, ke denove estas restarigita unueco de Internacio proletliberpensula spite al ĉiuj disrompantoj, ke oni sukcesis eviti disbaton kaj transdonon de IPF al Bruxelles-a (Brusel-a) burĝa internacio.

Tio havas grandegan signifon, ĉar furioza ofensivo de la plej nigra kulturreakcio, preskaŭ nehavanta por sí ekzemplon en la mondhistorio, estas efektivigata de la burĝaro kontraŭ la mizeriĝintaj amasoj en ĉiuj landoj.

Fluo de konkordatoj, de leĝoj pri subpotencigo al pastroj de lernejoj, de miliardaj ŝtatsubvencioj al eklezioj, de blasfemulprocesoj kaj drakonaj cenzuragoj, de persekutoj kontraŭ antiklerikala arto en ĉiaj ĝiaj formoj ruliĝas tra la kapitalista terglobo. Granda armeo de nigrornatuloj kaj predikantoj ĉiukonfesiaj, salajrataj el impostoj, kunmetataj el laborulaj groŝoj, instigas al milito kontraŭ Sovetunio, ĉie faras blokon kun faŝistaj partioj, penas forlogi atenton de laboristamasoj for de la klasbatalo, konsolante ilin per plibona «postmorta vivo».

Ĉi tiu kulturreakcio estas nur parto de ĝenerala trusta-kapitalista reakcio. Ĉiuj atakoj de klerikaluloj servas por subteno al disfalanta kapitalista ekonomio kaj socio, al kreskanta ekspluatado de amasoj, al pliiĝanta ilia politika premado, al batalo kontraŭ revolucia proletariaro kaj al senpera militpreparado kontraŭ Sovetio.

La kapitalista mondo travivas la profundan kaj ĉiam pliakriĝantan krizon. Kapitalistoj de ĉiuj landoj svingas en produktadejoj brutan vipon de la raciigo. Milionoj da laboristoj kaj dungitaj oficistoj staras antaŭ maldungo kaj estas devigitaj toleri planan malplialtigon de salajro kaj malplibonigon de laborkondiĉoj.

Ĉirkaŭ 20 milionoj da proletarioj en tuta mondo estas senlaboraj, sen inda al homo loĝejo kaj vestaĵo, sen perspektivo denove esti enigitaj en kapitalisman produktadprocedon.

Milionoj da malriĉul-kamparanoj, kolonianoj kaj malgrandaj farmistoj pro la agrarà krizo estas tirataj al neelirebla ruiniĝo. Laborula mezklaso suferegas sub kreskanta ŝarĝo de impostoj, tributoj kaj malkreskanta aĉetkapablo de proletmilionoj.

Milionaj amasoj de laborula homaro konscias, ke la bankrotinta kapitalismo minacas al ili ĉiam per novaj kaj novaj ŝarĝoj, per sanga

faŝista diktaturo kaj novaj militoj

Ili serĉas eliron el terurega kapitalisma katastrofo.

La burĝaro mobilizas ĉiujn siajn fortojn por plifortikigi sian diktaturon. Ĝi rapidtempe en ĉiuj landoj forŝiras lastajn demokratecajn kulisojn, ĝian ekspluatistan hegemonion kaj transiras al malkaŝaj faŝistmetodoj de premado.

En tia tempo antaŭ la estinta ekzekutivo de IPF staris granda tasko: en ĉiuj landoj, kie la kapitalismo svingas sian vipon, mobilizi, organizi kaj konduki vastajn amasojn al batalo kontraŭ religio de l'kapitalo, kontraŭ disŝtelado de impostoj, kunmetitaj el laborulgroŝoj, kontraŭ la aroganta ofensivo de la kulturreakcio kaj faŝismo.

Sed Hartwig-oj, Sivers-oj, Ronzal-oj kaj Lebenhard-oj ne pensis pri defendo de proletaj klasinteresoj. Ili havis nur solan zorgon: sufoki klaskonsciajn organizaĵojn kaj opozicion en IPF, eksigi centmil membrojn kaj forrompi ilin. Ili havis nur solan celadon: piedpremi kaj perfidi la rezolucion de la III IPF-kongreso en Köln, kiu devigis liberpensul-internacion al la klasbatalo. Ili havis nur solan celadon:

dispecigi Internacion de proletliberpensuloj per disrompo kaj amaseksigo, tute malfondi ĝin en ĝenerala kongreso kaj transdoni ĝin al la burĝaro — al Bruxelles-a burĝa liberpensulinternacio

La revoluciaj liberpensulaj organizaĵoj de Germanio, kalkulantaj pli ol centmil membrojn, estis derompitaj de Sivers-asocio kaj ne estis al ili permesita reprezentado en IPF.

La ĉefa SVAZ pro ĝia revolucia kulturpolitika laboro estis eksigita el IPF de manianta per grandeco diktatoro.

La revoluciaj organizaĵoj de franciaj liberpensuloj, nepacigeble batalantaj kontraŭ burĝaj liberpensulorganizaĵoj, ankaŭ estis devigitaj sammaniere plu ne esti membroj de IPF.

La laboristoj-liberpensuloj de Svisio estis senrajtigitaj sendi sian reprezentanton al la IPF-kongreso.

Sivers kaj liaj konfidatoj tute malkaŝe estis dirantaj pri tio, ke ĉe plej proksima oportuna okazo Unio de militantaj ateistoj de Sovetio sammaniere estos deklarita de sinjoroj social-faŝistoj eksigita.

Kiu povas esti konsternita, ke la disrompantoj renkontis la oficialan delegiton de belgia liberpensula asocio per fiincitado kaj uzis ĉiuspecajn artifikojn por kontesti ĝustecon de lia mandato.

Ĉi tiu celkonscia disrompa agado estis efektivigata intence de Hartwig, Sivers, Ronzal kaj Lebenhard dum la tempo de la k r e s k a n t a k u l t u r r e a k c i o, dum la tempo, kiam ĉiuj ĉi tiuj por ili mal-

amindaj organizaĵoj kaj derompita opozicio gvidis decidajn amasagojn kontraŭ la papa incitado al milito kontraŭ Sovetunio, kontraŭ brokantistoj de l'konkordatoj en iliaj landoj kaj kontraŭ fremdaj al la laborista klaso duonfaŝistaj, burĝaj liberpensulaj kaj kremaciaj organizaĵoj.

Ĉi tiu hontinda provo detrui IPF estis tieldire «preparado de IV IPF-kongreso» per la social-faŝista burokratio, kiu volis gvidi la kongreson sen partopreno de amasoj, sen partopreno de la klaskonscia parto de liberpensuloj, sed en ĉeesto de nur trifoje kribritaj social-demokrataj frakcikamaradoj.

Dum Hartwig-oj kaj Sivers-oj provis disigi IPF, ili traktis kun la reprezentanto de burĝaro. Kelktempe antaŭ la IV kongreso de IPF en burĝa gazetaro liberpensula de Holando, Belgio kaj Ĉeĥoslovakio oni povis legi, ke la traktado inter Brusela Internacio kaj Sivers-Hartwig-oj pri kunfandiĝo venis al la fino kaj ke

„Germana liberpensula asocio" jam aliĝis al Brusela Internacio

Tio estas neniom stranga. La social-demokrataj diktatoroj de IPF volas fari al la liberpensula movado la samon, kion ili jam faris al la cetera laborista movado: kune kun la 2-a Internacio ili marŝis inspirite al Ligo de Nacioj, kune kun la Amsterdama sindikatinternacio ili laboras en metiejo de Ligo de Nacioj por garantii kapitalistajn superprofitojn kaj nun ili volas enma-

nigi liberpensulajn organizaĵojn al la burĝaro por subteni la internacian kulturreakcion.

En la liberpensulaj kaj kremaciaj asocioj, regataj ankoraŭ de ili, ni trovas kiel honormembrojn tiajn sinjorojn socialdemokratajn ministrojn kaj parlamentanojn, kiuj salutis la papan «krucmilitiron» kontraŭ Sovetunio, kiuj konfirmis konkordatojn kun la eklezio, kiuj konsentis miliardajn subvenciojn al la eklezio, kiuj volis doni la socialistan proletariaron en manojn de la «religia socialismo», kiuj kiel ministroj kaj intrigantoj ŝtelas de laboristoj la salajron, kiuj kiel policistoj-socialistoj pafas al malsataj senlaboruloj, kiuj sidas ĉe la ŝtata nutraĵujo kaj malhelpas al vastaj amasoj, jam delonge rompintaj kun la eklezio, foriri el ĝi.

Tiel Sivers-Hartwig-oj helpas al la kulturreakcio. Tiel ili estas defendantaj la kapitalistan ekspluatistan socion. Tiel kun cinika furiozeco ili batalas kontraŭ la revolucia liberpensula movado.

Dum periodo, kiam milionaj laborulamasoj de kapitalista mondo s t a r a s a n t a ŭ l a d i l e m o: a ŭ l a f a ŝ i s t a d i k t a t u r o kun sangoplena teroro kaj kun neesprimeblaj suferoj — a ŭ l a r e v o l u c i a k l a s b a t a l o ĝis la falo mem de la kapitalismo, kiel sola elirvojo el la minacanta katastrofo, — dum ĉi tiu periodo Hartwig-oj, Sivers-oj kaj Ronzal-oj indignas kaj furiozas kontraŭ la klaskonsciaj liberpensuloj kaj perfidas al ĉiuj principoj de la marksismo. Estas tute klare, ke tiu, kiu

agas kiel disrompanto kaj perfidulo, tiu estas ne nur malamiko al la liberpensuloj, sed precipe r e k t a

vojpreparanto por sangoplena faŝismo kaj por nova imperialista milito kontraŭ Sovetunio

Sed Hartwig-Sivers-oj ne nur preparas vojon por la faŝismo. Ili mem opinias IPF-on kazernoj, en kiuj ili rajtas komandi. Ili piedpremas ĉiujn principojn de la proleta demokratio, kraĉas al la rajto de liberapartiĝo de membromilionoj en IPF, plejpartege aprobantaj programon de l'maldekstra alo, ili mem uzas en IPF kaj en ĉiuj regataj de ili organizaĵoj rekte faŝistajn metodojn de perforto por garantii sian pozicion kaj por subpremi ĉie pliflamiĝantan opozicion.

Ili organizas ataktaĉmentojn, mobilizas kapitalistan faŝistan policon, instigas burĝan juĝistaron kontraŭ opozicimembrojn kaj aktivulojn, perforte akceptigas en ĝeneralaj kongresoj faŝistajn statutojn, laŭ kiuj la gvidantaro rajtas diri ĉion, sed viemembroj nenion, ili prokrastas dum monatoj kaj jaroj membrokunvenojn, eksigas el konferencoj kaj kongresoj ĉiujn maloportunajn por ili klaskonsciajn delegitojn kaj ignoras volon kaj rajtojn de l'membroj.

Ni rondigu la bildon. La vojpreparantoj al la faŝismo, utiligantaj kontraŭ la klaskonsciaj liberpensuloj eĉ metodojn de la faŝista teroro, per tio vere indaj je nomo socialfaŝistoj, eĉ fingron ne movas por helpi la proletariaron kaj klaskonsciajn liberpensulojn en la landoj de l'faŝista diktaturo, en Pollo, en limitrofoj, en balkanaj ŝtatoj kaj en Italio.

Ĉi tiuj homoj, subtenantaj la ĉiuforman imperialisman politikon de sia burĝaro, eĉ fingron ne movas pòr subteni la duonkoloniajn kaj koloniajn popolojn en ilia batalo kontraŭ la kapitalistaj misiistoj, kontraŭ religia kontraŭinstigado kaj stultigado, kontraŭ sanga imperialista premado kaj ekspluatado. Ĉi tiuj homoj malkaŝe preparas militon kontraŭ Sovetunio, remaĉas ĉiujn elpensaĵojn de trusta burĝaro, prisilentas grandegajn sukcesojn de la kvinjarplano, provas malhelpi kaj mortsilentigi la socialisman konstruadon en USSR, ili ne pensas pri tio, ke estu popularigita en amasoj fortega kulturrevolucio kaj ke ĝi estu defendita kontraŭ la instigantoj de l'milito.

Ĉi tiuj disrompantoj kaj perfiduloj, kiel perdinta ĉiajn esperojn malplimulto, volis kuraĝi derompi kaj eksigi potencan plejmulton de sekcioj kaj membroj de IPF.

Ĉi tiuj social-faŝistoj el tri germanlingvaj landoj, en kies organizaĵoj konsistas nur iuj 600.000 liberpensuloj kaj el kiuj jam multe pli ol 100.000 opozicias al la perfiduloj, efektive intencas arogante «eksigi» el IPF la revoluciajn reprezentantojn de 8 landoj, post kiuj staras ĉirkaŭ 4 milionoj da organizitaj liberpensuloj por transiri poste kun siaj organizaĵoj al la burĝaro.

La klaskonscia plejmulto de la IV IPF-kongreso radikale forstrekis el kalkulo ĉi tiujn agentojn de l'pastraro kaj burĝaro.

Sivers, Hatwig, Ronzal kaj Lebenhard, la kvar socialfaŝistaj organizantoj kaj instigantoj de la disrompo kaj perfido, estis eksigitaj el IPF.

La IV IPF- kongreso kun la delegitoj el USSR, el Germanio, el Ĉeĥoslovakio, el Aŭstrio, el Polio, Francio, Belgio kaj Svisio faris ĉi tiun decidon unuanime. Ĝi forĵetis la disrompantojn kaj garantiis la unuecon de IPF. Ĝi eksigis kvar personojn, sed la laboristoj de la germania kaj aŭstria liberpensulasocioj kaj de la Germana asocio en Ĉeĥoslovakio restas membroj de IPF kiel antaŭe. Tiom pli, ke en ĉiuj tri landoj ribelo kontraŭ la socialfaŝistaj disrompantoj eĉ inter membroj-socialdemokratoj troviĝas en plena disvolvo.

Por ĉiu pensanta laboristo estas klare: Sivers-oj, Hartwig-oj, Ronzal-oj kaj Lebenhard-oj estis decidintaj en sia frakcikunsido transiron al Bruxelles. Ili iros tien kun grupeto da frakcikamaradoj, sed dekmiloj da laboristoj ne permesos disrompon, disbaton kaj transdonon de IPF al la burĝaro. Ili restos fidelaj al IPF kaj al la decidoj de la IV kongreso en Teĉen-Bodenbaĥ kaj kune kun siaj klaskonsciaj fratoj per unueca fronto batalos kontraŭ la kulturreakcio, amasmizero kaj la faŝismo.

La IV kongreso de IPF alvokas ĉiujn liberpensulojn de Germanio, Aŭstrio kaj germanlingva Ĉeĥoslovakio en siaj membrokunvenoj pritrakti eksigon de la disrompantoj kaj decidi, ke ili restu senkondiĉe fidelaj al IPF kaj decidoj de ĝia IV kongreso en Teĉen-Bodenbaĥ kaj ke ĉiu klaskonscia liberpensulo defendu la unuecon de la militantaj ateistoj kontraŭ ĉiaj atakoj.

La IV IPF-kongreso salutas promeson de anglaj laboristoj el L o n d o n o, de skandinaviaj laboristoj el K o p e n h a g o kaj S t o k h o l m o, de amerikaj laboristoj el Ĉ i k a g o kaj de japanaj laboristoj el T o k i o pri

ploj baldaŭa kreo de klaskonsciaj liberpensulorganizaĵoj

La IV IPF-kongreso precipe fierante eksciis, ke subjugita hindia proletariaro vekiĝis de la religia incito kaj transiras en Bombay al kreo de revoluciaj kontraŭreligiaj organizaĵoj.

La IV kongreso salutas ĉiujn subjugitojn kaj subpremitojn de ĉiuj landoj kaj rasoj kaj vokas ilin kuniĝi en fortaj vicoj kaj subteni IPF en ĝia batalo.

Internacio de proletliberpensuloj sendas al K o m u n i s t a I n t e r n a c i o kaj al R u ĝ a S i n d i k a t i n t e r n a c i o sian varmegan batalsaluton kaj majeste deklaras, ke la internacia liberpensulmovado konsideras sin parto de la revolucia laboristmovado tutmonda kaj donos ĉiujn fortojn por insiste kaj sinofereme laŭ la doktrinoj de Marx, Engels kaj Lenin labori ĉe la klasbatala frontoparto, apartenanta al la klaskonsciaj liberpensuloj, celante efektivigi radikalan renverson, kiu liberigos la homaron de la kapitalista sklaveco, forigos la anarkion de l'kapitalisma produktadprocedo, detruos la kapitalisman varekonomion kaj kreos la socialisman ekonomion kaj socion, en kiu estos elŝiritaj profundaj radikoj de religiaj superstiĉoj kaj la homaro estos libera de l'religiopiumo.

La IV kongreso sendas al la laboristoj kaj kamparanoj de Sovetunio varmegan saluton kaj admiroplenan ateston de grandegaj sukcesoj en la socialisma konstruado kaj en efektivigo de la senekzempla en la mondhistorio kulturrevolucio, per kiu vere nur komenciĝas unue la efektiva homarhistorio.

Por ĉiuj liberpensuloj estos plej granda kaj plej honora tasko defendi Sovetunion kaj batali por transformo de kapitalistaj ankoraŭ en ilia hodaŭo landoj en la socialisman patrion.

Vivu la unueco de Internacio proletliberpensula!

Antaŭen, al batalo kaj venko!